



Protokolo de la Estrar-kunsido de ELI, 3-a de Julio 2017

Ĉeestantoj: Amri Wandel, Jehoŝua Tilleman, Ŝlomo Ŝaĥar, Asaf Ĥefec, Eran Vodevoz, Matida Landaŭ, Dror Gaon, Eldad Salzman

La estraro kondolencas pro la forpaso de Liana Elaŝvili. Eble ŝia filo venos al la Klubo kaj parolos pri ŝi.

*Protokolo de la antaŭa kunsido (5-a de Junio 2017) – aperas publike en la retejo - <http://esperanto.org.il/estraro.html>, kaj estis ankaŭ dissendita al la estraranoj. – **aprobita***

Raporto

Favora recenzo de Ulrich Lins pri la memorlibro de Josi aperis en la julia n-ro de Esperanto.

1. Abono de Juna Amiko (Lea).

Lea petas ke ELI abonu ĝin, por helpi prepari programojn en la klubo. **Decido:** *aprobita unuanime*. **Plenumo:** Amri skribos al la redaktoro, Stano Marĉek.

2. Israela Kongreso en Akko 2018 (Jehoŝua)

Jehoŝua rezervis 20 ĉambrojn en la junulargastejo en Akko por 3-5 de majo 2018. Amri subskribis kaj sendis la kontrakton. La baza prezo (loko en du-persona ĉambro por du noktoj kaj du vespermanĝoj) kostos 576 NIS. Salono sen aldona kosto.

3. Reklamado kaj vendoj en la UK en Seŭlo (Amri)

a) Necesas printi la afiŝon **pri 20-a IK 2019 en Eilat** /MONA en Akaba por disdono en la UK. **Decido:** *aprobita unuanime*. **Plenumo:** Amri

b) Propono de Ŝoŝia pri monda distribuo de sia E-KD per agentejo (Ofer)

Decido: *aprobita*. **Plenumo:** Amri traktos kun ŝi pri la detaloj.

c) Ankaŭ por la UK: pliaj ekzempleroj de la Memorlibro kaj IE. **Decido:** *aprobita unuanime*. **Plenumo:** Amri

4. Jerusalema Libro-Foiro 11-15/6 (Amri)

a) Amri kunmetis kaj deĵoris ĉiutage 11-23h, partatempe sole, kvankam plurfoje petis helpon.

b) Publika debato pri E-o kaj la ideo de Internacia Lingvo, kun Doron, Tali kaj Amri. La 14.6-an, je la 19:00. Aperis en la oficiala programo.

c) Centoj da flugfolioj estis disdonitaj. Venditaj libroj por ĉ. 1000 NIS (plej furoris "La eta Princo" kaj "Bridge of Words", vidu punkton 9 sube.

d) Estonte deĵorplano estu antaŭkondiĉo por mendi. **Decido:** *aprobita unuanime*.



5. Inaŭguro de la E-tabulo en la preĝejo Patro Nia (Oliva Monto) okazis la 14.6-an je la 16:00, Ĉeestis la franca konsulo, la artisto, la monaĥinestrino kaj pluraj E-istoj.

6. Nova reklam-kampanjo (Amri)

Amri mendis en Facebook, specife pri la Jerusalema Libro-Foiro, celita al Jerusalemo kaj Tel-Avivo. 180 NIS por 7 tagoj. Specifa celgrupo (TA kaj Jerusalemo, lingvaj kaj sociaj intereskampoj). 4000 personoj vidis, ĉ. 400 ŝatis.

7. Proponoj por oficejo (Ŝlomo)

Ŝlomo trovis proponon por nova oficejo, malgranda (20 m²) en Ramat Gan. Diskuto: estas bezonata pli granda kaj en Tel-Avivo. **Rekomendo:** *Ŝlomo daŭrigu la serĉadon.*

8. Pola kulturcentro (Amri) - proponas organizi ekspozicion pri Zamenhof. La ekspozicio estis farita de la pola ministerio pri eksteraj aferoj. Ni renkontiĝis kun **Avigail** kaj diskutis en la Libro Foiro okaze de la E-panelo. Ŝi serĉos ejon. Eventuale en Bet Hatfucot.

9. Grupa mendo de la nova Libro de Esther Schor "Bridge of Words" (Amri)

Jagil mendis 8 ekzemplerojn, kaj Ŝlomo repagis al li 760 NIS. Tri mendoj de s-anoj (Jehoŝua Ŝaul Ĥasid, Ora Maŝiaĥ), por 100 NIS. 4 ekz. estis venditaj en la Foiro (por 120 NIS). Ankaŭ 4 ekz. de la Eta Princo en E-o estis venditaj en la Foiro.

10. Dratverejo -38 תמא (Eran)

Advokata raporto, resumo ne sendita. Eran kontaktis kun la advokato.

11. Somerfina kafeja kunveno: lunde la 28/8=an ? *Decido: jes!*

La venonta kunsido: lunde, la 4-an de septembro 2017, je 19:45

Protokolis: Amri Wandel